**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 36

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Pli feliĉa sinjoro sen havo, ol riĉulo sed ␣ **kl** ␣**v**␣.

**2. V**␣ **rg** ␣ doloras, sed saĝon ellaboras.

**3.** Nuntempe dum serĉado de minoj geologoj uzas ankaŭ geobotanikan **m** ␣ **t** ␣ **d** ␣ ␣, kiu konsideras la influon de la subteraj mineraloj al la koloro de floroj.

**4.** Bardejov estis parto de grava komerca vojkruciĝo kaj lige kun tio ĝi ricevis diversajn privilegiojn kaj en 1376 la **r** ␣ **ng** ␣ ␣ de libera reĝa urbo.

**5.** Ne postlonge el la dispartigita sidloko la doganistoj elprenis kelkajn pakaĵojn kun blanka ␣ ␣ **lv** ␣ **r** ␣ – jam estis klare, kio okazis.

**6.** La fakto, ke oni ŝtelas **p** ␣ **lt** ␣ ␣ ␣, estas malnova kaj ekzistis jam en la epokoj trogloditaj.

**7.** Videble ankaŭ la koro de Vinicius batis sub la skarlata tuniko per neordinara **r** ␣ **tm** ␣, ĉar lia spiro iĝis mallonga kaj vortoj ŝiris sin en la buŝo.

**8.** La faŭno de la indonezia insularĉeno varias de unu insulo al alia, havante vere aziajn ␣ **r** ␣ **jt** ␣ ␣ ␣ en la okcidento kaj forte aŭstraliajn en la oriento.

**9.** Antaŭ nur kelkaj jardekoj oni diferencigis du **t** ␣ **p** ␣ ␣ ␣ de virusaj hepatitoj: la infektan hepatiton kaj la seran hepatiton.

**10.** Aliflanke estas multegaj homoj, kiuj ege sopiras ␣ **b** ␣ **n** ␣ la revuon, sed neniam povis kaj ne povos pagi kotizon por ili tro altan.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Nek la ŝtato nek la **as** ␣ **k** ␣ **r** ␣ ␣ kompanioj havas sufiĉe da mono por pagi tiom da pensioj.

**2.** La temoj de la libroj estas tute diversaj, en mia percepto ili facile unuiĝas sub unu ĝenerala demando pri la **e** ␣ ␣ **nc** ␣ de homa ekzisto.

**3.** Unu el la sekvoj de tiu altiĝo de temperaturo en meza Eŭropo estas, ke ordinaraj ŝtormoj (de pli fruaj tempoj) nun fariĝas veraj **t** ␣ **mp** ␣ **s** ␣ ␣ ␣ kun terura detruforto.

**4.** Estis precipe Usono, kiu **i** ␣ **s** ␣ **st** ␣ ␣ pri interveno kontraŭ Serbio, tamen ne fare de UN sed de NATO, kaj per tio eĉ riskis gravan konflikton kun Rusio.

**5.** Petronius ordoninte alporti al si verbenon, komencis ĝin **fl** ␣ **r** ␣ kaj froti per ĝi siajn manojn.

**6.** Ne, Ligia! – vokis Vinicius – mi **ĵ ␣ r ␣ ␣** al vi, ke neniam iu virino estis tiel respektata en la hejmo de sia edzo, kiel vi estos en la mia.

**7.** Herhor venis la unua kaj kun granda emocio **gr ␣ t ␣ l ␣ ␣** la monarĥon pri la venko super Libianoj.

**8.** La drako elspiris fajron el siaj sep buŝegoj por ekbruligi la sekan herbon kaj **s ␣ f ␣ k ␣** la junan ĉasiston en la fumo kaj varmego.

**9.** Ne ĉiam ĉiuj povis konsenti al la opinioj de Gilbert Ledon, sed neniam liaj artikoloj, ofte provokaj, **t ␣ d ␣ ␣** legantojn, ĉar li kapablis per originalaj pensoj pensigi.

**10.** La sakon mi metos sur la dorson, ĝi povos estis utila al mi, sed por kio taŭgas la bastono, ĝi estos nur superflua **ŝ ␣ rĝ ␣**.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

kin', absurd', huf', konfirm', foir', avid', emerit', park', aŭtor', senat'.

**1.** Por tia verko estus tre facile kaj necese doni normalajn referencojn al respektivaj artikoloj kaj libroj kun indikoj de ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ **c** ␣, datoj, paĝoj ktp.

**2.** Nazarius alportis al la knabino du koturnojn, kiujn li aĉetis en ␣ ␣ ␣ **r** ␣ **j** ␣ per sia propra, perlaborita mono.

**3.** La pastroj tro konfidas al sia potenco, malbone pagas la spionojn kaj forpuŝis de si la tutan Egipton per sia ␣**v**␣ ␣ ␣ **c** ␣ kaj malhumileco.

**4.** La orelojn de Vinicius atingis nur ankoraŭ la vorto: "dioj", ĉar la ceteron obtuzigis la bruo de la ĉevalaj **h** ␣ ␣ ␣ **m** ␣ ␣.

**5.** La "realaj" bildoj pri detruado de Bagdado konsiderinde superas eĉ la plej hororan holivudaĵon en la loka ␣ ␣ **n** ␣ **j** ␣.

**6.** Nuntempe pli ol 100 000 turistoj jare vizitas la lokon kaj malfacilas trovi ␣ ␣ **r** ␣ ␣ **j** ␣ ␣.

**7.** Nero aŭskultis konsolojn de ␣ ␣ ␣ ␣ **t** ␣ **n** ␣ ␣ kaj kavaliroj kun ŝtona vizaĝo kaj faris spektaklon de patra funebro, kiel ĝin farus komedianto sur scenejo.

**8.** Mia laboro estis interesa kaj la salajro sufiĉa, nun mian ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ ␣ **c** ␣ ␣ mi ĝuas en bela urbo apud la oceano, kie la klimato estas bona kaj mi studas Esperanton.

**9.** EURO<26 estas havinda karto, kiun povas ricevi gejunuloj en la aĝo 14-26 jaroj, sen aparta ␣ ␣ ␣ **f** ␣ ␣ ␣ ␣ **l** ␣ kaj sendepende de sia statuso.

**10.** Tiu ĉi kaĉo da problemoj, mankoj kaj ␣ ␣ ␣ ␣ **r** ␣ ␣ **ĵ** ␣ ␣ fine kondukis al pereo de la ŝtatkapitalisma Sovetio.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Ankaŭ infektitaj gravedulinoj povas infekti per la viruso siajn ___.

**a.** teoriojn **b.** apartamentojn **c.** modelojn **d.** bebojn

**2.** Multaj metiistoj elspezas pli ol tion ĉi por ___, ne parolante jam pri drinkoj.

**a.** moskitoj **b.** cigaroj **c.** muskoloj **d.** apotekoj

**3.** La vizaĝhaŭto de la junulo ŝrumpis, la korpo ___, ĉesis kreski barbo, lia stranga aspekto estis enigmo por kuracistoj.

**a.** velkis **b.** oscedis **c.** signalis **d.** ĉagrenis

**4.** En nia lando la plej granda verda folio certe estas la folio de ___ – ĝi estas terure granda kaj neniam kreskas sola, kie unu kreskas, tie kreskas ankaŭ aliaj.

**a.** acero **b.** pomarbo **c.** lapo **d.** fago

**5.** La 31-jaraĝa Sandra Valančauskaitė, nomata fera virino, decidis konkeri la maksimuman distancon de la maratono (55 kilometrojn) marŝante ___, t.e. frontante malantaŭen.

**a.** kaprice **b.** reve **c.** teorie **d.** kankre

**6.** En la 1960aj jaroj sur la tegmentoj staris ___ kun longaj metalaj stangoj ligitaj per kabloj: televidantenoj.

**a.** mastoj **b.** vulpoj **c.** terenoj **d.** simioj

**7.** Hodiaŭ ni bezonas la ___ forton de Snowden kaj aliaj por indiki, kiel pekas niaj politikaj mastroj en nia nomo.

**a.** ĵaluzan **b.** reciprokan **c.** moralan **d.** kriplan

**8.** La vojeton kronis malluma, densa arbaro: deodaroj, nuksujoj, sovaĝaj prunoj, olivaj kaj ___ arboj, sed precipe deodaroj t. e. himalajaj cedroj.

**a.** piraj **b.** kruelaj **c.** heredaj **d.** kritikaj

**9.** Stratoj pavimitaj per betono, ekzemple, montras kelkajn fendojn aŭ enhavas kelke da interspacoj plenigitaj per ___.

**a.** parko **b.** stango **c.** velo **d.** gudro

**10.** La folioj kaj ___ de frakseno estas uzataj medicine jam de antikvaj tempoj en la preventado de reŭmatismo, podagro, ostoporozo ktp.

**a.** strio **b.** ŝelo **c.** robo **d.** urso